

BAES^{★★}


Brazila Asocio de Esperantistoj-Spiritistoj

Gazeto de BAES

Aperas 2-foje jare

1-a jaro | n-ro 1 | Majo 2021

1



ÉMILIE BOIRAC

La tute ne sekreta agado de la iama
prezidanto de la Lingva Komitato

La 11-a BRES
okazos en 2021

Nova estraro estos elektita
por laŭvica trijara mandato



B

SEN PAGA
Elektronika eldono.
(Korektita versio, 2.1)
Presitaj ekzempleroj
haveblas laŭmende.



ALKLAKU
por kontakti
la redakcion.

La laŭvica
n-ro aperos
en Septembro.

Gazeto de BAES | 1-a jaro | n-ro 1 | Majo 2021 | aperas dufoje jare
Organo de *Brazila Asocio de Esperantistoj-Spiritistoj*, fondita en 2008
ST SHIS QI 25 CJ 14 Casa 22, Braziljo-DF
Tel.: +55 61 981878785 | baesbrazilo@gmail.com | baes.org.br

Redaktisto: Cecílio Tomé | **Grafikaranĝo:** Leandro Abrahão
Pri la subskribitaj artikoloj respondas la aŭtoroj mem.

Kunlaborintoj: Harison de Alencar, Leandro Abrahão,
Matheus A. Firmino, Marcionilo Neto | **Provlego:** Rodrigo Mendonça,
Paulo César Pires, Luís Sérgio Morais, Tamiris Maciel Queiroz

Speciala danko al *Biblioteko Carlos Domingues*, Brazilo, kaj al
Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj, Aŭstrio.

Bildoj kaj Fotoj: Wikimedia, pixabay.com, propra arkivo.

ESTRARO DE BAES (Mandato 2018-2020)

Prezidanto: Fábio André Evaristo dos Santos;
Vicprezidanto: João Marcos Borges e Azevedo;
1-a Sekretario: Onício Cândido Neto;
2-a Sekretario: Bruna Brasil Santos;
Kasisto: Myrella Mendonça Brasil Santos.
Kontrola Konsilantaro: Eurípedes Alves Barbosa;
Waldir Antônio Silvestre; Darci Gomes Sardinha.



Versio 2.0

1. Paĝo 8: ...grasigita teksto sur paĝo **ses...** > ... sur **ĉi tiu paĝo...**

2. Paĝoj 20-21: ...ke la verkoj en kiuj ĝi **esta...** > en kiuj ĝi **estas...**

Versio 2.1

Kelkaj modifetoj koncernantaj komponon kaj aspekton.

ENHAVO

p. 06 | [Émile Boirac - ĉefteme](#)

p. 08 | [Ek al esplorado! - sprone](#)

p. 12 | [Kio estas Spiritismo? - felietone](#)

p. 24 | [Matheus Artioli Firmino - intervjue](#)

p. 27 | [Transiro... tien - nekrologe](#)

p. 30 | [La 11-a BRES estas alvenonta - informe](#)

p. 32 | [Laste aperis - informe](#)

p. 33 | [Evangeliaj plukoj - edife](#)

p. 34 | [Convocação para a Assembleia Geral Ordinária da ABEE - oficiale](#)

MALFERME

Debutas nia Gazeto. Kiel ĝi nomiĝas? Simple “Gazeto”... de BAES, la Gazeto de nia Asocio.

En ĉi tiu unua numero ni ĝoje prezentas al vi la ĉeftemon de la 11-a Brazila Renkontiĝo de Esperantistoj-Spiritistoj – BRES, kaj per la ĉefartikolo iel pravigas la elekton de la ĉi-jara organiza komitato.

Estas vaste konata la rolo de la Brazila Spiritisma Federacio – BSF sur la kampo “Esperanto kaj Spiritismo” ekde 1909. En Reformador, organo de BSF, aperis en la 15-a de Februaro artikolo de J. Camille Chaigneau sub la titolo *O Esperanto e o Espiritismo* (Eo: Esperanto kaj Spiritismo). Laŭ Reformador, la teksto aperis pli frue, en 1908 “en la revuo de Gabriel Delan-

ne”, kaj reaperis en *La Vie d'Outre-Tombe*, de Charleroi.

Sed, kio pri la prafederaciaj iniciatoj kaj pioniroj? Ankoraŭ restas multo por spuri kaj esplori. En ĉi tiu unua numero nia redakcio indikos kelkajn fontojn, kiuj espereble vekos ĉe vi scivolon.

Se vi donos vin al esplorado de iu el ili, kaj se vi ion malkovros, sciigu nin, ni petas! Retleteru al ni aŭ aliĝu al la vacapa grupo de BAES.

Ne hazarde la ĉeftemo de BRES estas “Esperanto kaj Spiritismo: originoj kaj pioniroj”. Ni esperas, ke nia komunumo aŭ helpos nin traesplori la temon, aŭ aliĝos al la evento por ekscii ĉion, kio estas dume eltrovita.

La 11-a BRES okazos en la 15-a de Aŭgusto en reta versio. Eblas senpage aliĝi al ĝi ekde

la 7-a de Junio ĉe baes.org.br. Ne maltrafu novaĵojn! [Kontaktu nian redakcion](#) kaj konigu al ni vian retadreson, ni petas.



Ni estas konvinkitaj, ke agadi **per** Esperanto estas agadi ankaŭ **por** ĝi. Ilustre menciindas la kongreso¹ de katolikoj, okazinta en Parizo, en 1910. Carlo Bourlet (1866-1913), eminenta franca Esperantisto, informis pri ĝi en unu el siaj *Babiladoj* – rubriko en la fama gazeto La Revuo:

Jes, ni *uzu* Esperanton!

Pri tio niaj katolikaj samideanoj liveras al ni plej imitindan ekzemplon (...).

Tiu kongreso *ne* estos kongreso de *Esperantistoj*, ĝi estos internacia kongreso de *Katolikoj* uzantaj Esperanton por kune studadi, pritrakti kaj eble solvi katolikajn demandojn ĉu religiajn ĉu sociajn (...).

Jen la unua ekzemplo de neesperanta kongreso internacia, kiu uzos internacian lingvon (...).

Jen la vera maniero definitive enradikigi Esperanton en la mondo!

Moviĝante, ni pruvu la eblecon de l' movo!

Bonan legadon (kaj esploradon) deziras al vi la *estraro de BAES*, la *redakcio* kaj la *organiza komitato* de la 11-a BRES!

1. En 1909 dum la Universala Kongreso de Esperanto en Barcelono, Hispanio, katolikoj decidis okazigi sian unuan kongreson en Parizo, en 1910. Dum tiu kongreso IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista) estis fondita. (Fonto: ikue.org)



Jen la vera maniero **definitive** enradikigi
Esperanton en la mondo!

Moviĝante, ni pruvu la eblecon de l' movo!

El la verketo "Monumento de Carlo Bourlet",
2-a eld., 1987, BSF.



Parto de artikolo el la verko “**Nia Diligenta Kolegaro: Biografio de 200 eminentaj esperantistoj**”. Serio *Scio*, Volumo 10. Eldonejo Sezonoj. Aŭtoroj: Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov.

Grasigo fare de la redakcio.

Boirac, Augustin Émile [bŭarák]. Franco. Nask. 26 aŭg 1851 en Guelma (Alĝerio). Filo de negocisto Jean Boirac kaj ties edzino Feline Salvate-Portan. Studis filozofion kaj literaturon en la Bordoza Universitato, bakalaŭriĝis pri literaturo (1872), agregaciĝis pri filozofio (1874), doktoriĝis pri filozofio (1894) per la tezo *La ideo de la fenomeno*. Ekde 1871 dum 26 jaroj instruis filozofion en francaj liceoj,

fine en la renoma liceo Condorcet (1882-97). Profesoro pri filozofio kaj rektoro en la universitatoj de Grenoblo (1898-1902) kaj en Diĵono (Akademio de Diĵono, 1902-17). Membrokorespondanto de la Franca Akademio de Sciencoj Moralaj kaj Politikaj (1906).

En 1876 proponis la terminon "dĵavu" kaj iĝis konata fakulo pri paramnezio. Studis hipnozozon (en 1911 premiita

de la Akademio de Sciencoj), praktikis ĝin kaj spiritismon. Kun aliaj fakuloj esploris la mediumajn kapablojn de Eusapia Palladino. Aŭtoro de pluraj sciencaj, didaktikaj kaj popularaj verkoj (*Baza kurso de filozofio*, 1892; *La ideo de la fenomeno*, 1894; *Lecionoj de psikologio aplikata al edukado*, 1902; *Kurso de moralo por normalaj lernejoj*, 1905; *Nekonata psikologio*, 1908; *Estanteco de la psikaj sciencoj*, 1917 k. a.) (...).

En 1885 edziĝis kun Baptistine Rose Joséphine Bertrand (1859-1917); kvar infanoj (unu el ili, subleŭtenanto Émile Lucien Élie Boirac, naskita en 1890, batalis en fronto ekde la komenco de la Unua Mondmilito kaj mortis pro vundoj en majo 1915). Kvin monatojn post la forpaso de sia edzino (21 apr 1917) Boirac mortis

20 sep 1917 en Salses (dep. Pyrénées-Orientales) en malklaraĵaj cirkonstancoj (Laŭ unu versio: dum spiritisma seanco; laŭ alia versio: per sia propra decido, perdinte la emon al la vivo.). Entombigita en Salces, 6 okt 1917 resepultita en Diĵono. Unu el la stratoj de Diĵono havas lian nomon.

Esperanto: 1900 (Adresaro, N^o 5777) danke al la matematikisto prof. Ch. Méray. Aktive propagandis Eon; post liaj prelegoj fondiĝis E-grupoj en kelkaj urboj. Enkondukis Eon en la programon de eksterlandaj studentoj en la Diĵona Universitato. Verkis kaj tradukis kelkajn librojn en/pri Eo, okupiĝis pri leksikografio, kompilis trivoluman vortaron Eo-Ean, kunlaboris en *L'Espérantiste*, *La Revuo*, *Oficiala Gazeto E-ista* kaj aliaj E-gazetoj. Prezidis la 1an UK en



7-a Internacia Kongreso de Esperanto, Antverpeno, Belgio. Veturado al la oficiala akcepto de la Urbeŝtraro. Boirac estas indikata ruĝkoloro.

Fonto:  Österreichische Nationalbibliothek

Bulonjo-ĉe-Maró (1905) kaj kunredaktis kun Zamenhof la kongresan protokolaron. Membro de KKK. Elektita de Zamenhof kiel prezidanto de LK (1905). Membro de la Komitato de la Delegacio por Akcepto de Internacia Helplingvo, kiu 24 okt 1907 en lia foresto (lin anstataŭis G. Moch) akceptis principe Eon kun ŝanĝoj efektivigitaj de la Konstanta Komisiono de la Komitato de la Delegacio interkonsente kun LK. Dum la Ido-krizo (1907-08) komprenis, ke la centpersona LK ne estas laborkapabla kaj proponis fondi ties gvidorganon en la formo de Akademio, kies unua prezidanto li iĝis (1908-17). **En 1912 kunfondis Mondan Asocion de Spiritismaj E-istoj kaj iĝis ĝia unua prezidanto.**

Bibliografio: EdE, p. 57-58 k. a.; LZ, Vol. 1, p. 7-8 k. a.; OVP, p. 36. Condette J.-F. *Les recteurs d'académie en France de 1808 à 1940. Tome II, Dictionnaire biographique.* Paris, 2006, p. 76-77. S-ro *Émile Boirac* (OGE, 1917-1918, N^o 7-8); Delcourt M., Amouroux J. *Filozofoj kaj esperantistoj* (Eo, 1977, N^o 11); Amouroux J. *Émile Boirac* (LG, 2011, N^o 154).

Noto: KKK = Konstanta Komitato de la Kongresoj; LK = Lingva Komitato.

Sekvas niaj komentoj.

EK AL ESPLORADO!

Ni povus elstarigi plurajn partojn de la teksto. Ĉi-numere ni startu per la ruĝe grasigita teksto sur paĝo ĉi tiu paĝo: **“En 1912 kunfondis Mondan Asocion de Spiritismaj E-istoj kaj iĝis ĝia unua prezidanto.”**

En Reformador, organo de Brazila Spiritisma Federacio, aperis en Septembro 1942 artikolo de Ismael Gomes Braga. Ĝia titolo estas *Rememorando* (Eo Rememorante). Jen kion li skribas: “Ni reiru al la pasinteco. **Tio**

estis en 1912. Pro iniciato de spiritistoj el Francio kaj Belgio **ni fondis mondan asocion de spiritistoj-esperantistoj.** Prezidanto, Émile Boirac; poeto el niaj idealoj, Camille Chaigneau.”

Ismael mencias la Asocion per minusklaj komencliteroj, male al la biografia teksto pri Boirac. Nu, verŝajne temas pri la “*Esperanta Psikistaro: Internacia Unuiĝo por Psikisma Studado per Esperanto*”. Almenaŭ koincidas la prezidanto.

La dirita Asocio eldonis en 1910 “*Esperantan Verketaron*”. Temas pri kolekto de artikoloj, ĉefe tradukitaj en Esperanton fare de A. Stas kaj J. Camille Chaigneau. Jen kio legeblas sur la frontpaĝo:

Esperanta Psikistaro

Psikismo kaj Esperanto

INTERNACIA UNUIĜO POR PSIKISMA STUDADO PER ESPERANTO

Sub la honora prezido de S-ro Émile Boirac, Rektoro de la Universitato de Dijon, Francujo.

Rimarkindas: *Eldono publikigita per la zorgoj de la “BELGA SPIRITISTA FEDERACIO”.*

Jen kio legeblas tuj post la enhavtabelo:

Esperanta Psikistaro

INTERNACIA UNUIĜO POR PSIKISMA STUDADO PER ESPERANTO
(Hipnotismo, Magnetismo, Telepatio, Spiritismo, ktp.)

Sub la titolo “ESPERANTA PSIKISTARO” fondiĝas internacia Unuiĝo per Esperanto, por internacie studadi la psikismajn aferojn (fenomenojn, dokumentojn kaj laŭvole teoriojn.)

Kial do **1912** estas, laŭ Korĵenkov kaj Ismael, la fondodato de la aludita Asocio? Reformador dufoje raportas pri la organizaĵo, en Marto kaj Junio 1909. Eĉ pli kurioze, Zamenhof (p. 9, 1-a eld.) mesaĝis el Varsovio al la “*Esperanta Psikistaro*” en la 12-a de Novembro 1908:

Karaj Sinjoroj,

Kun plezuro mi ricevis vian sciigon pri la fondo de la “Esperanta Psikistaro”.

Ke mi plene aprobas la fondon de via Unuiĝo, pri tio vi, kompreneble, ne povas dubi. Al la Esperanta Psikistaro mi sendas mian plej sinceran saluton kaj bondeziron.

Via

L. L. Zamenhof.




7-a UK, Antverpeno, Belgio

En 1911 okazis Subkongreso de la Esperanta Psikistaro kadre de la 7-a Universala Kongreso. Raporto pri ĝi estas publikigita fare de la Unuiĝo. En ĝi legeblas i.a. kial la verketo eldoniĝis *per la zorgoj* de la belga Federacio, kaj kiel estiĝis la ideo pri organi-

zita agado. La “Sekretario”, nome A. Stas¹, rakontas dum la unua kunsido, ke tia ideo aperis “antaŭ kvar jaroj”, do jam en 1907. ■

Nu, multo estas ankoraŭ esplorinda...

1. Kvankam la “Raporto de la Sekretario” ne estas subskribita, en la verketo de la Esperanta Psikistaro A. Stas aperas kiel sekretario de la “Iniciativa Komitato”, kiu estis elektota dum “speciala kongreso” – kredeble la 7-a UK.



Psikisto deziras transpaŝi la limojn de la videbla mondo kaj penetri en pli profundan regionon, kie kaŝiĝas la veraj kaŭzoj kaj principoj de ĉiu realeco. Simile **Esperantisto** deziras transpaŝi la limojn de sia nacieco kaj penetri en la spiriton de la tuta homaro. [...].

Al scienco de la venontaj tempoj t.e. al Psikismo plene konvenas do la lingvo de la estonta homaro: t. e. Esperanto.

El la verketo “Esperanta Psikistaro”,
2-a eld., 1911, p. 10

KIO ESTAS SPIRITISMO?


Artikolo de **Gabriel Delanne** (1857-1926, Parizo, Francio), aperinta en la “Kunlabora Verketaro” de la Esperanta Psikistaro (ĉi tie retajpita laŭ la 2-a eldono, paĝoj 37-45), tradukita el la franca en Esperanton fare de J. Camille Chaigneau. La artikolo estis “speciale verkita” por la koncerna verketo (vidi paĝon 14).

En nia Gazeto aperos felietone ĉiuj artikoloj el la dirita verketo, tiel ke estontece, komence en elektronika formo, ni povu reeldoni ĝin kun prikomentoj kaj historiaj notoj. Tiucele BAES starigis **Eldonan Fonduson**. Por monsubteni la Fonduson PIX-ĝiru al la bankokonto de la Asocio (baesbrazilo@gmail.com).


Kovrilo
2-a eldono



Frontpaĝo
2-a eldono



Frontpaĝo
1-a eldono



La 2-a eldono de la verketo, aperinta en 1911, estas disponebla en la [Wikimedia Komunejo](#). Pri la 1-a indas iom pli longe rakonti.

PRI LA UNUA ELDONO

Noto de Leandro Abrahão
leandro.brazilo@gmail.com

En la Esperantomuzeo en Aŭstrio la unua eldono ne estas rete rigardebla. Por konsulti la verkon necesus mendi fotokopiitan ekzempleron. Nu, la prezo estas sufiĉe alta.

Antaŭ kelka tempo mi vizitis la *Bibliotekon Carlos Domingues*, ĉe Brazila Esperanto-Ligo, Braziljo. S-ino Néia, respondeca oficisto, helpis trafosi la retan katalogon, sensukcese. En la Biblioteko troviĝas pluraj maloftaj verkoj, kiuj ankoraŭ ne estas katalogitaj. Néia avertis, ke nur *tre bonŝance* mi povus ion trovi, ĉar ordinaraj iuj verkoj estas kune binditaj. Necesus trafoliumi plurajn bindaĵojn.

Tie estis 1,5-metra metala bretareto kun pluraj maloftaj Esperantaĵoj ambaŭflanke. Efektive, mi devis trafoliumi kelkajn el ili. Tamen, dum la unua vizito nenio estis trovita. En la dua vizito lumeto fariĝis. Sur la dorso de bindita, verdkolora "libro" estis legeble: "Spiritismo". Montriĝis, ke plurajn verketojn oni ja bindis kune. Feliĉe, ie en ĝi mi ekvidis la frontpaĝon de la unua eldono

(mankas kovrilo). Kia ĝojo! Estas kelketaj diferencoj inter ambaŭ eldonoj. Indas iam prezenti ilin.

En la revuo *Reformador* aperis en 1961 artikolo de Zêus Wantuil (jaro 79, n-ro 4). En ĝi li referencas al la publikigo de la verko en 1911, kaj aldonas: "la 1-a spiritista publikaĵo en la internacia lingvo". Piednote li malkaŝas ion surprizan: "Ne konfuzi tiun verketon kun la Revuo de la Esperanta Psikistaro, trimonata esperantista revuo por propagando de Spiritismo kaj studado de rilataj fenomenoj, kies unua numero aperis en Antverpeno, Belgio, en Januaro 1913." Li notas krome, ke al tiu revuo kontribuis ekzemple Ismael Gomes Braga (1891-1969). Mi gapis...

Pri tiu revuo mi nenion trovis en la reta katalogo de BSF, nek en la aŭstria Esperantomuzeo, nek (almenaŭ ĝis nun) en *Biblioteko Carlos Domingues*. ■

KIO ESTAS SPIRITISMO?

GABRIEL DELANNE

Inĝeniero de la Centra Lernejo,
Prezidanto de la *Société française d'étude des Phénomènes psychiques*,
Direktoro de la *Revue scientifique et morale du Spiritisme*.
El la franca lingvo tradukis J. C. C.

Ni korektis evidentajn miskompostojn. En ĉiuj aliaj okazoj la modifoj, espereble pravaj, estas klarigataj sur [paĝoj 22-23](#).



Por respondi la demandon kiu estas temo de ĉi tiu artikolo, utile estas alĵeti rigardon sur la nunan staton de la problemo pri ekzisto kaj senmorteco de la animo. En Eŭropo, dum multaj jarcentoj, la religio katolika superregis kaj sufiĉis por kontentigi ĉiujn sciemojn pri la “transo” (pri kio okazas trans la morto). La dia revelo estis fiksinta la sorton de ĉiuj estaĵoj. La bonuloj, tio estas kiuj obeas flekseble la Eklezion en la persono de ĝiaj reprezentantoj, aliris la Paradizon, feliĉegan lokon iom malĝuste konitan, sed kiun oni supozis esti trans la firmamento. La malbonuloj – la nekredantoj, la maljustuloj – estis destinataj por suferi terurajn malfeliĉadojn

en la Infero, kie legioj da demonoj turmentegis ilin dum la eternado. La purgatorio kaj la limboj estis lokoj intermezaj en kiuj la estontaj elektuloj pagis sian ŝuldon, korektis sin, ĝis la momento de ilia aliro en la ĉielon.

Tuj de la “renesanco”, inaŭgurigis nova tempo, la liberekzamenata spirito malvolviĝas. Galileo pruvmontras ke la Tero¹ rondiras, ke ĝi ne estas la centro de la mondo, ke ĉio ekzistanta ne estis farata pro² ĝi. Tiam la universo pligrandiĝas nemezureble, kaj nia malgrava planedo de nun estas nur punkto nedistingebla en la senlimo de la mondoj. La kosmologio de la Biblio, same kiel la dogmo kiu sur ĝi sin apogas, ricevis de tio frapon el kiu ĝi ne releviĝis; ĉar la geologio, siavice, pruvis al ni ke la kreo de la mondo laŭ sep tagoj kaj tiu de la homo estas nur infanaj legendoj. Poste venis la enciklopediistoj kaj la laboroj de la scienculoj de la 19-a jarcento, kiuj montris kiom la instruadoj de la katolikismo estas kontraŭaj al la racio kaj al la scienco; pro kio³ postvenis la kredon nereduktebla skeptikismo.

La homa spirito estas tia ke ĝi iras ĉiam al la ekstremoj. La reenago⁴ kontraŭ la religio

alkondukis la triumfon de la teorioj materialismaj, kiuj nuntempe estas alprenitaj de la plimulto el la kleruloj en la tuta mondo. Aliparte, la filozofoj spiritualistaj, je la sekvo de Descartes, igis la ideon pri animo preskaŭ nekomprenebla, kavigante fosaĵon netrainsireblan inter la penso kaj la materio, tiamaniere ke la demando pri ekzisto de la animo, konsiderata kiel individuaĵo diferenca de la korpo, fariĝis por multaj problemoj nesolvebla. Ĉu do ni devas rezigni la esperon scii, pri tiu temo, kio estas reale? Mi tion ne kredas; sed, anstataŭ argumenti ĝis neatingebla, ĉikanante pri la diskutataj punktoj, ni devas forlasi la kampon de la metafiziko por tiu de la scienco, t. e. ke estas preferinde ataki la problemon per la eksperimenta metodo kiu uzas observadon kaj eksperimentadon. Estas tiu irado kiu, de tri jarcentoj, igis nin plenumi la gravegajn progresojn kiujn oni konstatas nuntempe en ĉiuj fakoj de la sciencoj. Ĉu tia serĉado estas efektivebla? Ĉu oni povas submeti la animon al precizaj metodoj de observado ekstera? Mi ne hezitas respondi ke tio estas science farebla.

Jen kie spiritismo aperas kun sia tuta originaleco. Flanke lasante la teoriajn diskutadojn, ĝi aliras rekte la demandon pri fakto. Ĉu estas eble, jes aŭ ne, konservi rilatojn kun tiuj kiujn oni nomas la mortintoj? La moviĝantaj tabloj, postvenante la “hantajn”⁵ fenomenojn, estis la unuaj iloj ebligantaj starigi komunikojn kun la nevidebla mondo. Komprenoble, ne temas tie ĉi pri supernaturo nek pri mirinda, kaj inter la sennombraj rakontoj publikigitaj pri tiu objekto, ni devas forigi ĉiujn fantaziajn fabelojn kiuj estas senvaloraj. Ni konsentu nian konfidon nur al homoj plene indaj, per ilia scio, por esti gvidantoj en tiaj esploroj. Necesege estas ke oni sciu ke enketoj treege multnombraj estis entreprenataj en la tuta mondo pri tiu afero kaj ke ĉiuj konkludis favore por la realeco de la faktoj. Ni do vidu rapide kiaj estas tiuj fenomenoj.

Konate estas ke, se kelkaj personoj metas siajn manojn sur tablon, rekomencante multfoje la eksperimenton, plej ofte la meblo unue moviĝas kaj poste respondas inteligente al demandoj kiujn oni faras. Oni devas do distingi du aferojn: 1-e la kaŭzon

de la movo; 2-e la naturon de la inteligentaĵo kiu respondas.

La unua supozo kiu tuj prezentas sin estas ke la eksperimentantoj, konscie aŭ ne, agas sur la tablon por ĝin movi. Estas tio kion certigis Chevreuil, Babinet, Faraday, k. t. p. Sed pli atenta studo de serĉantoj kiel Profesoro Thury, Agénor de Gasparin, kaj aliaj, montris ke tiu klarigo ne estas valora por ĉiuj okazoj, ĉar ofte la meblo moviĝas *sen kontakto* de la eksperimentantoj.

La *Societo Dialektika*, de Londono⁶, en 1869, post longaj serĉadoj, same konkludis. Sciencaj fizikistoj, kiel Robert Hare kaj Crookes⁷, uzante instrumentojn speciale konstruitajn por tiu celo, igis nedubebla la ekziston de tiu forto kaj mezuris ĝian intenscon. Fotografajoj obtenitaj⁸ de S-roj Ch. Richet, de Rochas, Flammarion, Lombroso, MorSELLI, Ochorowicz, vidigas ke objektoj flugpendas en la aero sen subportilo videbla. Estas do pruvite nun ke iu formo de la energio, kies naturo estas ankoraŭ nekonata, eksteriĝas el la korpo de iaj individuoj nomitaj *mediumoj* kaj povas ekmovi materiajn objektojn. Tiu forto obeas la volon. Tial oni donis al ĝi la nomon *forto psika*.

Kiu estas la inteligentaĵo direktanta tiun forton? Kelkafoje, ĝi estas tiu de la observantoj mem; sed, en multaj aliaj okazoj, ĝi pruvas ke ĝi estas sendependa de ili, malkaŝante faktojn nekonatajn de ĉiuj ĉeestantoj. Milope atestantoj kleraj, sinceraj, tion certigas, tion en la tuta mondo. La nevideblaj estaĵoj, kies volo movas la tablon certigas ke ili vivis sur tero kaj ili pruvas sian identecon. Tio estas rekta pruvo de postvivo, kiu malcedis kontraŭ ĉiuj kritikoj; kaj, tial ke ĝi multobliĝis senlime, oni kalkulas nun multajn milionojn da spiritistoj⁹ tra la tuta mondo.

Poste oni rimarkis ke la tablo estas nur perilo, kaj ke, se medio prenas krajonon aŭ plumon, la nevidebla inteligentaĵo povas direkti la brakon de la subjekto kaj igi ĝin skribi vortojn, frazojn, plenajn paĝojn, kvankam tiu subjekto ne konscias kion ĝia mano skribas sur la papero. Tio estas la meĥanika skribo¹⁰. Tiamaniere oni obtenis ankoraŭ pruvojn konvinkajn, tial ke la aganta inteligentaĵo povis skribi same kiel dum ĝia vivado, t. e. doni aŭtografojn, kiuj estis aŭtentikaj dokumentoj epli-

gantaj rekoni nediskuteble la *identecon* de la nevidebla aganto. En multaj okazoj, la fenomeno sin prezentas kun tiaj karakteroj, ke ĉiu ajn alia hipotezo ol tiu de la interago de la postvivantaj animoj fariĝas logike nebla. Tio estas nome kio okazas, kiam malaltaĝaj infanoj skribas korekte, aŭ kiam la komunikaĵo estas donata per individuoj tute malkleraj. Ĉi tie ankoraŭ, la atestoj estas multegaj, kaj mi nur povas peti la leganton sin turni al la verkoj kiuj traktas pri tiu demando¹¹.

La pastroj de ĉiuj religiaj fakoj provis kredigi ke tiuj komunikaĵoj estas faro de la Diabolo. Ĉar la ekzisto de tiu mita personaĵo estas neniel certa, mi preferas sekvi la metodon logikan, kiu rekomendas ne multigi la kaŭzojn sen neceso; tial ŝajnas al mi pli saĝe opinii ke tiuj inteligentaĵoj estas vere tiuj de homoj loĝintaj sur la tero, ĉar tion ili certigas unuvoĉe en la tuta mondo.

La pruvmontro de la ekzisto de la *mi*, de la postvivo post la morto, estas daŭrigata per la ekzameno de la fenomenoj de aperoj, kiuj povas sin prezenti propramove aŭ okazigite. De

1882, formiĝis en Anglujo kaj en Ameriko vasta asocio, nomita *Societo de Psikaj Serĉadoj*, kiu enhavas inter siaj membroj la plej altajn sciencajn eminentulojn. Tiel ĝin partoprenis fizikistoj kiel Crookes, Oliver Lodge, Barrett, membroj de la “Reĝa Societo”, naturalistoj kiel Alfred Russel Wallace (la konkurinto de Darwin), psikologoj kiel profesoro Sidgwick, Gurney, F. W. H. Myers, Podmore, k. t. p., ne kalkulante famulojn el la literatura aŭ politika mondo, kiel S-ro Balfour kiu estis ĉefministro. Aro tiel kompleta de la plej diversaj kompetentuloj certe taŭgis por lumstudi la problemojn al ĝi submetitajn. Dudek tri volumoj, ĝis nun, sub la nomo *Proceedings*, kun la *Journal* (Ĵurnalo) de la Societo, enhavas la rezultatojn de ĝiaj enketoj pri la okazoj de aperoj kiuj estis komunikataj al ĝi. Oni tie trovas ankaŭ eksperimentojn pri la transdono de la penso kaj okazojn de disdubiĝoj¹² eksperimentaj de la homa estaĵo. Tiam oni vidas ke la fantomoj de la vivantoj kaj de la mortintoj sin rivelas al ni kun nediskutebla aŭtentikeco. Tiuj aperoj enfermas en si mem pruvojn ke ili ne estas haluci-

noj; ĉar ofte la fantomo portas stigmatojn aŭ vundojn kiujn la vidantulo¹³ ne konis, sed kiujn oni rekonis realaj sekve de serĉadoj entreprenitaj por kontroli tiujn faktojn. Tio estas certigo, per la scienco moderna, de tiuj rakontoj pri aperoj je kiuj estas plenaj la Analoj kaj la Sanktaj Libroj¹⁴ de ĉiuj popoloj.

Tiam oni eltrovas ke la animo ne estas nur abstraktaĵo, parola imago, ideala koncepto sen objekta realeco; sed, kontraŭe, ke ĝi estas konkreta estaĵo, posedanta korpon formitan el materio treege subtila, kiun la spiritistoj nomis *perispirito* (el *peri*, ĉirkaŭ; *spiritus*, la spirito). Tiu korpo kopias la fizikan ŝajnon de la mortinto, kaj, kiam la cirkonstancoj estas favoraj, ĝi povas fariĝi videbla, per la ago de la forto psika kiu eksteriĝas el la mediumo. Ni estas tiam antaŭ tio kion oni nomas *materiigo*.

Tiufoje, oni povas laŭplaĉe studi la aperiaĵon, paroli kun ĝi, ĝin pesi, fotografi, obteni stamponjn aŭ muldaĵojn, unuvorte certiĝi per ĉiuj procedoj kiujn la scienco disponigas al ni ke oni vere estas antaŭ realaĵo nediskutebla, ne antaŭ halucino aŭ trompa artifiko.

Kiel ajn strangaj, neversimilaj tiuj faktoj povas ŝajni, ili havas por si, nun, la apogon de tre multenombraj scienculoj kiuj alvenis la konvinkon nur postkiam ili elĉerpis ĉiujn formojn kaj ĉiujn rimedojn de la neado.

William Crookes, dum tri jaroj, studis fantomon konitan sub la nomo Katie King. Li eksperimentis en sia hejmo, kun ĉiuj antaŭzorgoj por ne esti trompata; kaj nur postkiam li vidis ĝin samtempe kiel ĝian mediumon Florence Cook kaj ofte ĝin fotografis, lia konvinko fariĝis sufiĉe fortika por ke li kuraĝu konigi la rezulton de siaj serĉadoj, kiun oni povas resumi per unu el liaj frazoj: “Mi ne diras ke tio estas ebla, mi diras ke tio estas.” Kiel oni devis supozi, precipe antaŭ tridek jaroj, tiujn sensaciajn rakontojn akceptis ĝenerala skeptikemo. Sed la vero enhavas en si potencon nekontraŭstareblan. Estas ĝi kiu devigis la tiel eminentan fiziologiston, kiu estas S-ro Ch. Richet, membro de la Medicina Akademio, skribi: “Pro mia servutema respekto por la tradicio, mi eĉ mokis tion kion oni nomas *Spiritismo*, kaj, postkiam mi konis la mirigan raporton kiun Crookes publikigis, mi permesis min ridi je ĝi tiel verve kiel preskaŭ ĉiuj.

Sed, nun, mi diras kion diris mia amiko Ochorowicz en la samaj cirkonstancoj. Mi frapas al mi la bruston kaj diras: “Sinjoro, pardonu nin! Kiel mi povis konsenti ke la scienculo eltrovinta la taliumon¹⁵ kaj la radiometron, la antaŭulo de la eltrovo de la radioj Roentgen¹⁶, estus lasinta sin esti trompata per artifikoj kiujn infano estus povinta facile malkovri?”

Lombroso, la fama antropologiisto, faris ankaŭ sian *mea culpa*¹⁷. Postkiam li enklasigis la spiritistojn inter la frenezuloj kaj la nenormaluloj, post dek kvin jaroj, li konfesas sian eraron per la jenaj vortoj: “Mi akiris la konvinkon ke la spiritismaj fenomenoj estas klarigeblaj, por la plej multaj, per fortoj propraj al la mediumo, kaj por la ceteraj, per la interaĝo de estaĵoj superteraj, kiuj disponas fortojn pri kiuj la propraĵoj de la radiumo¹⁸ povas doni analogian ideon. La solvo de tiu problemo estas unu el la plej mirindaj fariĝoj de ĉi tiu nova jarcento.”

S-ro profesoro Flournoy, – parolante pri la eminenta psikologo F. W. H. Myers, kiu ankaŭ estis devigata alveni spiritismon, – eldiras la jenajn signifajn pripensojn: “La faktoj,

kiujn Myers mem rikoltis aŭ observis multope certigis al li la fundan verecon de la antikva konvinko pri la spiritoj, kies simpla eldiro kutimas okazigi krizojn epilepsiajn al la plej multaj¹⁹ el la modernaj pensuloj, escepte tamen se sufiĉas al ili vuali sian vizaĝon aŭ levi la ŝultrojn. Post plena pripensado, mi ne partoprenas ilian senton de abomeno aŭ kompatato; la tre kompleksa kaj science prilaboradita spiritismo de Myers ne ŝajnas al mi tuj elĵetinda pro la sola motivo ke ĝi estas je la antipodoj²⁰ de niaj nunaj sciencaj kutimoj.”

Spiritismo ebligas al ĉiu konvinkiĝi ke la morto ne estas absoluta neniigo, elŝutiĝo de nia personeco, salto en la maleston. Sin fundamentante sur faktoj, ĝi estas nedetruibla; ĉar tiuj ĉi reproduktiĝos ĉiam.

Ĝi ne estas religio²¹, ĉar ĝi havas nek pastrojn, nek kulton, nek dogmojn; ĝiaj instruadoj, ĉiam revizieblaj²², pruvigas per observado kaj eksperimentado, kaj ĝi ne pli petas helpon de la kredo ol oni tion petas en la naturaj sciencoj.

Tre dezirinde estas ke la verkoj en kiuj ĝi estas malvolvita

estu tradukataj en tiun miridan lingvon Esperanto, por ke la tuta mondo pli facile ekkonu la konsolojn kiujn ĝi alportas al ĉiuj plorantaj karan mortinton, al ĉiuj maltrankvile dezirantaj scii kia destino ilin atendas neeviteble trans la tombo.

Tia ankaŭ estas la opinio de la respektinda Alfred Russel Wallace kiu, unue materialisto konvinkita, fariĝis fervora adepto de la nova scienco.

“Spiritismo”, li diras, “pruvas la ekziston de formoj de materialoj kaj de ekzistostatoj²³ kiuj estas neakcepteblaj kiam oni juĝas laŭ la vidpunkto de la pura scienco fizika. Ĝi montras al ni ke la spirito povas ekzisti sen cerbo, estante disigita de ĉiu materia substanco pesebla; ĝi detruas la antaŭjuĝon pri la neniigo de la ekzisto post la malorganizo kaj la detruo de la korpo fizika; ĝi montras per rektaj pruvoj, tiel decidigaj kiel permesas la naturo de la okazo, ke la supozitaj mortintoj estas ankoraŭ vivantaj, ke niaj amikoj estas ofte kun ni, kvankam nevideblaj; tiel ili donas al ni la rektan evidentecon de tiu es-tonta vivado kiun tiom da personoj fervore deziras kaj kiu

mankas al ili, kio lasas ilin vivi kaj morti en maltrankvileco.

Estas netaksebla tiu certeco²⁴ obtenita per la spiritismaj komunikoj, ĉar ĝi detruas ĉiujn dubojn pri transa ekzisto.”

Laboradi por konigi spiritismon estas do liberigi la homan spiriton de la jugo de la truditaj dogmoj, ĝin malembarasi de la teruroj pri la morto kaj malfer-

mi al ĝi plej grande la pordojn de la senlimo. Tuj kiam la spiritismaj instruadoj estos enpenetrantaj ĉiujn konsciencojn, la Homaro regenerita irados per paŝo pli firma sur la vojo de siaj eternaj destinoj. ■

“



Tre dezirinde estas ke la verkoj en kiuj ĝi estas malvolvita **estu tradukataj en tiun miridan lingvon Esperanto**, por ke la tuta mondo pli facile ekkonu la **konsolojn** kiujn ĝi alportas al ĉiuj plorantaj karan mortinton, al ĉiuj maltrankvile dezirantaj scii kia destino ilin atendas neeviteble trans la tomo.

Gabriel Delanne

NOTOJ KAJ KLARIGOJ

Notoj de la redakcio = NR
La ceteraj notoj estas originalaj.

1. NR: “tero”, minuskle en la originalo.
2. NR: “po” en la originalo.
3. NR: "pro kio, postvenis la kredon nereduktebla skeptikismo" en la originalo.
4. NR: Supozeble "reen-ago", en la senco “kontraŭstaro”.
5. NR: Laŭ *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*: hant/i (tr) Vizitadi (se paroli pri fantomo): ~ata domo, kastelo; (f) tiu sceno ~as lian memoron.
6. *Raporto de la Societo Dialektika*, tradukita en francan lingvon de D-ro Dusart. (Leymarie eld.).
7. W. Crookes. *Serĉadoj pri la Spiritualismo*. (La Angloj iam ne uzis la vorton “Spiritismo”).
8. Pli ol unufoje, en la ĉiusemajnaj sorbonaj kunvenoj de la Pariza Grupo, mi aŭdis la verbon “obteni”, kaj neniu kompetentulo kontraŭstaris. Eĉ eminenta profesoro de superaj kursoj, demandita de mi pri tiu temo, aprobis la uzon de tiu vorto. Ĝi ŝajnas al mi tre utila, ĉar, ofte, “ricevi” ne sufiĉas. Certe, kiu obtenas, ricevas; sed, plie, li faris ion por ricevi. Aliparte, “obteni” estas sufiĉe internacia, pro la devena latina vorto “obtinere”; ĝi estas hispana, franca, angla, k. t. p. – (Noto de la tradukinto).
9. NR: Laŭ la lasta censo (2010) en Brazilo estas 3.848.876 da spiritistoj, t.e. 2,01% de la loĝantaro.
10. NR: Pri aliaj specoj de mediumeco, inkluzive de la t.n. *duonmekanika skribo*, vidi ĉapitron 15 (Pri la Skribivaj aŭ Psikografaj Mediumoj) en La Libro de la Mediumoj.

- 11.** Vidi: Aksakof, *Animismo kaj Spiritismo*; – Allan Kardec, *La Libro de la Mediumoj*; – Léon Denis, *En la Nevideblo*; – G. Delanne, *Serĉadoj pri la Mediumeco. La spiritisma Fenomeno*; – Erny, *La Eksperimenta Psikismo*; – Gardy, *Ni serĉu*; k. t. p., k. t. p.
- 12.** NR: Vidi ekz. La Libron de la Spiritoj, duan parton, ĉapitron 8 (“Liberiĝo de la Animo”).
- 13.** NR: Vidivaj mediumoj (vidi La Libron de la Mediumoj, duan parton, ĉapitron 14).
- 14.** NR: Vidi ekz. Samuelon 1:28 (Malnova Testamento) kaj Johanon 20, 11-13 (Nova Testamento).
- 15.** NR: Kemia elemento, kies simbolo kaj atomnumero estas respektive TI kaj 81.
- 16.** NR: Ankaŭ “Röntgen”.
- 17.** NR: Latina esprimo, kiu signifas i.a. “erarkonfeson”.
- 18.** NR: Se paroli pri *radiado*. Analoga ankaŭ al la radiado elektromagneta.
- 19.** NR: “al la plej *multe* el” en la originalo.
- 20.** NR: Laŭ *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*: 2 (f) Ĝusta malo, kontraŭo: *li staras je la antipodo de mia teorio*.
- 21.** NR: Aldona koncepto legeblas ekz. en la libro *Kio estas Spiritismo*, de Allan Kardec: “Spiritismo estas ne nur observoscienco, sed ankaŭ filozofia doktrino. Kiel praktika scienco ĝi konsistas en la rilatoj, kiujn ni povas starigi kun la Spiritoj; kiel filozofio ĝi tenas en si ĉiujn moralojn sekvojn de tiaj interrilatoj.”
- 22.** NR: “revizeblaj” en la originalo.
- 23.** NR: “modoj de ekzisto” en la originalo.
- 24.** NR: “Ĝi estas netaksebla tiu certeco” en la originalo.

MATHEUS ARTIOLI FIRMINO

Elpensinto de la 1-a BRES
matheus.kuritiba@gmail.com



En nia arkivo ni trovis la “Ĝeneralan Leteron de BRES”, verkitan okaze de la 1-a Renkontiĝo. En ĝi legeblas, ke la evento komence okazus en Julio 2006, tuj post la tiujara Brazila Kongreso de Esperanto, kaj ke la “junulo” Mateo estis “ĝia motoro”:

“Li pro motivo ekstervola al si devis transloĝiĝi al fora urbo portempe. Sen Mateo, kiu jam dissemas Esperanton en la koron de Amazonio, kie li estas (...), la homoj involvitaj kun li en la entrepreno decidis ĝin daŭre disvolvi, kun du ŝanĝoj (...).*

Temis pri ŝanĝo de dato kaj pri ampleksigo de la ĉeftemo. La evento ja okazis prokraste de la 13-a ĝis la 15-a de Oktobro 2006. Nia redakcio kontaktis Mateon kaj scivole demandis al li pri tiu frua periodo, kaj pri tio, kiel ĉio estiĝis.

* Loka Komitato, laŭ la dirita *Ĝenerala Letero*: Gracinda Maria Artioli Firmino (patrino de Mateo), Neusa Priscotin Mendes (MiMa) kaj Paula Cristina Medve Zulques.

Mateo, kiel estiĝis la ideo aranĝi eventon por Esperante parolantaj brazilaj spiritistoj?

Mi estas spiritisto ekde mia infanaĝo, kaj mi ĉiam estis tre aktiva en la Spiritisma Movado de mia urbo (Ribeirão Preto - SP). Tiel mi faris multajn spiritistajn geamikojn, ligitajn ĉefe al Centro Espírita Batuíra.

En 1998 mi eklernis Esperanton, sed mi komencis partopreni la esperantan movadon en 2001, inkluzive en spiritismaj grupoj en mia propra urbo. Ni regule ĉiusemajne studis spiritismajn verkojn en Esperanto. Paralele, mi partoprenis de diversaj Brazilaj Kongresoj de Esperanto (BKE), kiam mi faris bonajn esperantistajn spiritistajn (ES) amikojn. Kaj mi ekkonis aliajn ES-spertojn en Brazilo.

En 2003 mi komencis instrui Esperanton per Cseh-Metodo. En 2004 stariĝis granda grupo de gelernantoj en Spiritisma Centro Batuíra, kiu estis tre fruktodona. Multaj spiritistoj, de diversaj aĝoj, eklernis kaj enpasiĝis pri Esperanto.

En 2004 mi havis tre mirindan internacian sperton en esperanta vojaĝo en Eŭropo. Tie mi disvastigis Spiritismon en Internacia Se-

minario (Germanujo) kaj amikiĝis kun francaj spiritistoj.

En 2005 mi havis novan mirindan internacian sperton: per iu franca amiko, mi ekkonis kanadajn spiritistojn, kiuj ne parolis la internacian lingvon, sed invitis min prelegi en Simpozio pri Spiritisma Medicino, en Kanado.

Paralele, mi bedaŭris, ke la oficiala internacia movado de spiritistoj (plejmulte brazilanoj) ne uzadis Esperanton en siaj eventoj (Internacia Spiritista Kongreso).

Tiel mi perceptis bonan momenton por kunigi ĉiujn sincerajn spertojn de brazilaj kaj ne-brazilaj esperantaj spiritistoj, kaj okazigi la Unuan BRES, kaj tiel fari ponton por fortigi tiun movadon kaj disvastigi al la spiritistoj ke Esperanto ekzistas, viglas kaj povas flue esti uzada en internaciaj eventoj. Do, la ĉefaj celoj estis raciaj, emociaj, sed ankaŭ "strategiaj", "politikaj".

En 2005 mi tion proponis en Brazila Kongreso de Esperanto (Porto Alegre) kaj faris la samon en mia amata grupo de eks-lernantoj, tiam aktivaj esperantistaj spiritistoj. Ĉiuj ŝategis la ideon, kaj ni komencis regule renkontiĝi por plani kiel

fari, kiel disvastigi, decidi la temojn, kiujn inviti, ktp, tiel kiel faras loka komitato de kongresoj.

Ĉu la nomo BRES estis proponita tuj en la komenco aŭ ĝi aperis poste?

Tiam, kompreneble, MiMa, la granda inspiro de esperantista spiritisma movado en Ribeirão Preto, partoprenis. La nomo "BRES" estis kreita kune, en tiuj semajnaj renkontiĝoj. Ni planis ĝin okazigi en 2006. Ĝis nun la invito [troviĝas en la reto](#).

Ni scias, ke vi finfine ne povis partopreni la unuan aranĝon en 2006. Kio okazis?

En la komenco de 2006, ĵus diplomiĝinta kuracisto, la Brazila Armeo kunvokis min militservi en Amazonio. Mi estis, do, devigita forlasi la projekton. La grupo daŭre planis ĉion, kaj ekde tiam MiMa estris la komita-

ton. Mi nur de malproksime, kun malfacila interreta aliro (2006, Amazonio...), opinis, sugestis kaj apogis. Krome, por mi, speciale, la militservo estis tre malfacila sperto.

Dum la solena malfermo MiMa legis leteron senditan de vi. Ĉu vi ankoraŭ havas ĝin?

La leteron, kiun mi skribis tiam, mi ne plu havas.

*

Mia lasta komento estas, ke mi vidis la sekvajn BRES kun granda entuziasmo. Tamen, tiuj "strategiaj kaj politikaj" celoj iel perdiĝis, laŭ mia humila opinio. Post iom da tempo, mi mem ne plu akompanis la eventojn. Sed mi ankoraŭ pensas, ke BRES devus pli klare kaj direktive al la oficiala internacia spiritisma movado montri kaj pruvi, ke Esperanto utilas kaj pli taŭgas en internaciaj eventoj, tiel kiel Léon Denis idealigis. ■



Legio de Bona Volo (LBV) lanĉis elektronike Esperant-lingvan infanlibron. Temas pri "La familio de Jesuo".



Elŝutu ĝin senpage el [Google-libroj!](#)





TRANSIRO... TIEN.

Leandro Abrahão

(Aperinta premiere en La Lampiro, mar-apr 2021)



La forpaso de la brazila Esperantistino Neusa Priscotin Mendes (1949-2021), karesnome MiMa (jes, kun du majusklaĵoj, laŭ ŝia prefero mem) kortuŝis la Esperantistaron, ne nur en Brazilo. Al ŝi Rogener Pavinski, redaktoro de la revuo Kontakto, organo de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo), dediĉis en sia fejsbuka paĝo “la kovrilon” de la aprila numero de la revuo Esperanto: “10 jaroj kiel redaktoro de Revuo Kontakto. Mi dediĉas ĉi tiun kovrilon al mia ĵus forpasinta unua instruistino de Esperanto, MiMa.”

Esperanto Ilustrita raportis pri ŝi, ankaŭ la Bitu Bulteno de Brazila Esperanto-Ligo (BEL). Esperantistoj plurloke en Interreto kondolencis kaj bedaŭris, sed ne nur. Pli elstare estas la elverŝo de sentoj pri la ĉiam ridetanta emerita flegistino.

MiMa naskiĝis, vivis kaj forpasis en la urbo Ribeirão Preto -SP, kie ŝi dum multaj jaroj agadis por Esperanto i.a. ĉe APERP (Associação Pró-Esperanto de Ribeirão Preto), kies unu el la fondintoj ŝi estas. La sidejo de la Asocio estas ŝia domo mem. Tie ŝi, kiu ne havis gefilojn, vivis kune kun la jam maljuna

fratino, kiun ŝi verdire flegis ĝis ŝia forpaso antaŭ kelkaj jaroj.

Mi vizitis ŝin kun mia edzino en 2010, eble. La domo ekstere aspektis simpla. Nealta muro sur kiu estis nelonga vertikala stangaro kiel barilo. La garaĝo estis efektive la Asocia instruejo. Blanka tabulo sur la muro, seĝoj (ĉu brakaj, mi ne plu memoras). La vizitoĉambro estis la Asocia akceptejo. Bone aranĝitaj bretoj kun multe da klasikaj libroj. Danke al tiu vizito, ununura cetero, mi ricevis donace “Martan”, en traduko de Zamenhof, kaj “Fundamentan Krestomation”. Impresis min la zorga ordecio de la ejo. La Asocio kalkulis pri la profesia agado de loka Esperantisto, nome Claudinei.

Ni tranoktis tie. Multe konversaciis. Post la manĝo ŝi ekdis por siesto iom kline, pro, laŭ mia memoro, stomaka afero. Ŝi ja brave frontis plurajn kadukaĵojn, ĉe la kruroj, ekzemple. Tiu vizito ne estis hazarda, sed celkonscia. Ni ja vizitis la urbon la unuan fojon kaj aparte por intervidiĝi kun ŝi, kun kiu ni konatiĝis kelkajn jarojn pli frue.

Tio estis la jaro 2006. Ni vojaĝis al Campo Grande-MS, por partopreni eventon, nome CON-

CAFRAS-PSE, danke al kiu, kiel mi malkovris poste, s-ro Lício de Castro, eksprezidanto de BEL kaj de Esperanto-Asocio de Brazilo iam konatiĝis kun Esperanto¹. Temas pri spiritista aranĝo, kiu i.a. ofertas kursojn de kaj pri la Internacia Lingvo.

Tien vojaĝis Flávio Fonseca, pro invito de la Esperantisto kaj kuracisto Alexandre Melo, unu el la organizintoj de tiu jubilea evento, kiu tiam solenis sian 50-an jariĝon. Mi estis ege ĝoja! La unuan fojon mi partoprenus Esperantistan aranĝeton. Temis pri prelego, sed mi estis vere tre kontenta. Mi eklernis Esperanton kelkajn monatojn pli frue, iom pene, pro manko de lerniloj, en mia tiama loĝurbo, Uberlândia-MG. Tiam mi disponis sole nur pri la komputila programo de s-ro Carlos Pereira.

En la prelegoĉambro estis MiMa, gaja, parolema, entuziasma. Mi memoras, ke iufoje ŝi ne nur ekparolis, sed ekstaris por pli libere esprimi sin per movado de la brakoj. Mi... apenaŭ komprenis... ne nur ŝin. Tamen, mi memoras, ke mi kuraĝis ion demandeti al la preleganto. Laŭ tio, kiel mi aŭdadis

la prelegon kaj la ĉeestantojn mi notis (ĉefe mallerte) novajn vortojn, esprimojn. Post la fino de la prelego mi iris al ŝi, kiu al mi estis tre simpatia. Mi montris al ŝi mian liston de (mis) notitaj vortoj, kaj ŝi afable korektis ilin. Unu vorton mi aparte memoras: iomete (kiun mi notis erare).

Ŝi diris al mi (mi ne certas, ĉu en tiu okazo, ĉu iam poste dum CONCAFRAS), "vi bezonas iun libron. Mi sendos al vi". Post kelka tempo poŝtisto liveris al mi "Saluton! Esperanto Aŭtodidakte"². Mi tuj eklegis kaj elplenumis la taskojn en semajno. Mi estis tre, tre feliĉa! Ĝi estis mia unua lernolibro de Esperanto. "Saluton!" lernigas la lingvon senpere, per rekta metodo. Cetero, MiMa estis unu el la malmultaj brazilaj diplomitaj Cseh-metodaj instruistoj.

Baldaŭ en la sama jaro mi revidis ŝin. Okazis en Ribeirão Preto la 1-a Brazila Renkontiĝo de Esperantistaj Spiritistoj (BRES)³. Kiaj bonaj memoraĵoj! Ŝi estis unu el la organizantoj, kaj prezidi-

dis la eventon. En la laŭvica jaro la evento okazis en Uberlândia. Ŝi venis pli frue, por la preparlaboroj, kaj gastis en la domo de mia bopatrino. Ŝi kunportis ekzempleron de Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, pri kiu mi evidente avidis. Temis pri multekosta verko, kiun mi tiam neniel povus akiri. Iam mi estis foliumanta la vortaregon, ŝi sidis proksime. Jen ŝi subite diris, "mi donacas ĝin al vi". Mi raviĝis, vere preskaŭ krevis de ĝojo.

Mi neniam plu renkontis ŝin persone post tiu vizito en 2010. Tamen, ni plu korespondis reletere, kelkfoje interparolis telefone, kaj en la lasta tempo interŝanĝis mesaĝojn per vapo. Kiam forpasis Luiz Antonio de Oliveira, la ĉeforganizinto de la 2-a BRES en 2007, mi informis ŝin. Ŝi, tute neekscitite asertis, ke li simple transiris. Tion mi mem nun diras al mi. Ŝi transiris... tien, kie mi esperas iam povi brakumi ŝin. ■

1. Libro "CONCAFRAS 50 ANOS", Eldonejo Auta de Souza, intervjuo kun s-ro Lício.
2. Ismael Ávila produktis [senpagan komputilan version](#).
3. Ekde la jaro 2009: Brazila Renkontiĝo de *Esperantistoj-Spiritistoj*.

LA 11-A BRES, EN RETA VERSIO

En 2020 pro evidentaj kialoj la Brazila Renkontiĝo de la Esperante parolantaj spiritistoj ne povis okazi, almenaŭ fizike. En 2021 ĝi okazos per Zoom-kunveno en la 15-a de Aŭgusto.

Senpagaj aliĝoj ekde la 7-a de Junio ĉe la retejo de BAES
www.baes.org.br


15 Aŭgusto
 13h-19h
 (UTC-3)

La programo estas difinita. Du eroj tamen estas jam antaŭviditaj: **prelego pri la ĉeftemo** kaj la **Ĝenerala Asembleo**, en kies kadro i.a. elektiĝos nova estraro de BAES (mandato 2021-2023).

Aldone ni informas, ke intertempe **disponeblas speciala aliĝilo**. Kontraŭ R\$30 vi ne nur subtenas la Asocion, sed ankaŭ ricevas hejme *presitan* numeron la 1-a “Gazeto de BAES”. Ni havas *sole nur* 20 ekzemplerojn. Ekpuŝu la malsupran butonon kaj garantiu la ricevon de la via!



Jes, mi deziras aliĝi nun



BAES

Brazila Asocio de Esperantistoj-Spiritistoj

INVITAS

Esperanto kaj Spiritismo **ORIGINOJ KAJ PIONIROJ**

11-a Brazila Renkontiĝo de Esperantistoj-Spiritistoj - BRES

Rete en la 15-a de Aŭgusto 2021


Senpagaj aliĝoj ekde la 7-a de Junio ĉe baes.org.br

Alklaku ĉi tien
por elŝuti la
afiŝon.

Foto el "Pixabay": Centra Stacidomo en Antverpeno (Belgio), urbo kie en 1911 okazis la 7-a UK kaj la Subkongreso de la Esperanta Psikistaro.

POSTMORTAJ VERKOJ

La varme atendata traduko aperis danke al eldona kunlaboro de Brazila Spiritisma Federacio kaj Eldona Societo Lorenz.



Ĉi tiu libro, publikigita post la elkarniĝo de Allan Kardec, prezentas i.a. bonstille verkitan biografion de la Kodiginto, kiun sekvas parolado eldirita de Camille Flammarion okaze de lia entombigo. Temas pri kolekto da gravaj tekstoj postlasitaj de Allan Kardec.

Ĝi estas havebla ĉe la eldonintoj. Aldone ni informas, ke eblas senpage elŝuti aliajn verkojn.

Aĉeti ĉe BSF

Aĉeti ĉe Lorenz

Senpagaj
elŝutoj

Evangeliaj plukoj

“Kaj ne povante alproksimiĝi al li pro la homamaso, ili malkovris la tegmenton, kie li estis; kaj trafosinte ĝin, ili mallevis la liton, sur kiu kuŝis la paralizulo.” (Marko, 2:4)

LA PARALIZULO

Multaj personoj konfesas sian bezonon de la Kristo, sed ili ofte pretekstas obstaklojn, kiuj al ili nebligas la subliman alproksimiĝon.

Unuj ne havigas al si tempon por meditado, aliaj spertas iajn zorgojn, kiuj al ili ŝajnas senfinaj.

Sed por ke ni sentu nin proksimaj al la Majstro, kiel veraj interesatoj pri liaj senmortaj bonfaroj, al ni nepre necesas vastigi la kapablecon, pligrandigi la proprajn rimedojn kaj marŝi renkonte al Li sub la lumo de viva fido.

Rakontas la Evangelio laŭ Marko la strangan decidon de la paralizulo, kiu trovinte la do-

mon, kie estis la Sinjoro, plene okupita de la homamaso, anstataŭ perdi la okazon, helpis sin per la amikoj kaj lasis, ke oni lin enŝovu tra aperturo trabatita en la tegmento, por ricevi la bonfaran tuŝon de la Savanto, fervore profitante la dian okazon.

Rememoru la paralizulon el Kapernaumo, kaj se vi okaze troviĝos en grandaj malfacilaĵoj por ĝui la ĉeeston de la Kristo, pro materialaj kontraŭaĵoj, turnu vin al la Supro, sub la protekto de viaj spiritaj amikoj, kaj lasu vin fali ĉe liaj diaj piedoj, ricevante novajn fortojn, kiuj al vi restarigu la pacon kaj la kuraĝon. ■

Fonto: XAVIER, Francisco C. | Libro “Caminho, verdade e vida”
Spirita aŭtoro “Emmanuel” | 1-a eld. Brasília: FEB, 2020. ĉap. 118.
Plukita el Reformador, Aprilo 2021.



CARTA CIRCULAR

Convocação para a Assembleia Geral Ordinária da ASSOCIAÇÃO BRASILEIRA DE ESPERANTISTAS ESPÍRITAS - ABEE

Prezados Associados,

Em cumprimento ao que estabelece o estatuto da ASSOCIAÇÃO BRASILEIRA DE ESPERANTISTAS-ESPÍRITAS – ABEE, *CAPÍTULO III, para o cumprimento do disposto nos Artigos 36 e Parágrafo Único, 37, 38, 39 e Parágrafo Único*, convoco pelo presente edital a Assembleia Geral Ordinária da ASSOCIAÇÃO BRASILEIRA DE ESPERANTISTAS-ESPÍRITAS - ABEE para o dia 15/08/2021, Domingo, às 18:00 horas, em primeira convocação, ou a partir das 18:30 horas em segunda convocação, no âmbito do 11º ENCONTRO BRASILEIRO DE ESPERANTISTAS ESPÍRITAS – EBEE, a se realizar em modalidade a distância, com inscrições a partir do dia 7 de junho pelo site www.baes.org.br, com a seguinte pauta de assuntos:

- 1 – Apresentação de Relatório de Atividades para o triênio 2018-2020 e prestação de contas;*
- 2 – Eleição de chapa para Diretoria Executiva e demais cargos para o triênio 2021/2023.*

Poderão participar da Assembleia todos os sócios atuais ou os que a ela se filiarem até a véspera da realização do 11º EBEE. Os membros interessados em candidatar-se à Diretoria da ABEE, que

atendam aos pré requisitos estabelecidos pelo Estatuto, deverão fazer chegar a inscrição da “CHAPA COMPLETA”, em concordância com o disposto no Estatuto da Associação, por escrito, à Associação Brasileira de Esperantistas Espiritas, por meio do endereço eletrônico fabiosantos.gyn@gmail.com até o dia 15 de junho de 2021, até 23:59 horas.

Chapas inscritas na página do Facebook da ABEE não serão consideradas. Serão elegíveis e terão direito a voto todos os membros associados da ABEE que atendam os dispostos no Art. 8º inciso II.

O voto será individual e público. A apuração do escrutínio será imediata, após o encerramento da votação, ficando a fiscalização a cargo de uma comissão composta por um membro de cada chapa concorrente, se houver mais de uma chapa, ou da Comissão Eleitoral Constituída.

Vale ainda ressaltar, que a presença dos associados à Assembleia é imprescindível face à importância dos assuntos em pauta. A presente Carta Circular será enviada a todos os associados inscritos, encontrando-se também divulgada pela página do Facebook da Associação.

FÁBIO SANTOS
Presidente

BAES

Brazila Asocio de Esperantistoj-Spiritistoj

Oficialaj TTT-ejoj

Alklaku la ikonojn por aliri la koncernajn retejojn



“Amikaro de BAES”: Abonu la kanalon de la Asocio kaj ricevu novaĵojn pri ties atingoj. Se krom informiĝi vi deziras *agadi* en la asocia kadro, aliĝu al la vacapa grupo de BAES!



“BAES-Aktivuloj”: vacapa grupo de aktivuloj **pri kaj por** aktivula agado ĉe *Brazila Asocio de Esperantistoj-Spiritistoj*.



“Retejo de BAES” | www.baes.org.br
Vizitu nian retejon kaj aliĝu al la 11-a BRES!



Jen la Asocio ankaŭ en Fejsbuko.
Ni atendas vin tie! :)



PagSeguro

Donaca subteno por nia
Eldona Fonduso

PIX

baesbrazilo@gmail.com